

sub la suda kruco ★
marto 2017

ESPERANTO





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25 [1] numero 126 marto 2017

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de majo 2017

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.**

Copyright © 2016 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087.



SUR LA KOVRILO: Esther Parris ĉe la Esperanto-kongreso kaj somerkursaro en Brisbano, 2017.



5. Parolekzerco

5. Vizito al la insulo Pari

8. La sekretaj florkoloroj

9. Onklo Adolfo aŭ Gak til myren og bliv viis!

12. Miaj internaciaj promenoj

13. Johann Friederich Struensee

19. Poeziece Esperanto venkas

22. Aŭskultu Esperanto-muzikon

23. Kongreso en Brisbano

28. La jukatana regiono de Meksiko

30. Vegana fromaĝkuko

marto, du mil deksep

Bonvenon al 2017! Ŝajnas ke ĉi tiu jaro estos ege interesa. Donald Trump estas nun Prezidanto de Usono kaj sendube li faros grandajn ŝanĝojn, sed ĉu bonajn aŭ malbonajn? Aldone, estos nacia elekto en Nov-Zelando en septembro: ĉu la partio nun reganta dum preskaŭ 9 jaroj re-elektiĝos? Kaj ĉu Britio fakte eksigĝos el Eŭropo?

Dum decembro kaj januaro mia familio kaj mi refoje feriiis en Meksikio. Meksikio estas tre diversa lando kaj en ĉi tiu numero de ESK mi skribas pri nia vizito al la jukatana regiono kiu estas mia plej ŝatata parto de Meksikio.

Bonan legadon!



Ĉi tiuj meksikianoj atendis aŭtobuson...
kiu neniam alvenis



Aŭ ĉu ili eble trinkis tro da Esperanto-tekvilo?

Parolekzerco

MARTIN PURDY (UPPER HUTT)

Por daŭrigi la temon de Bob Felby en la pasinta numero de ESK, jen malgranda parol/prononcekzerco kiun mi kreis kiel juna esperantisto jam antaŭ kelkaj jardekoj por certigi ke miaj vokaloj estas (kaj restas) puraj kaj, se eble, ne influataj de la ĉirkaŭaj konsonantoj.

La metodo estas sufiĉe facila. Prenu frazon en Esperanto kaj forigu ĉiun konsonanton. Pli bone estus se alia persono elektus la frazon por vi, tial ke vi ne sciu pri kiu frazo temas. Ekzemple:

E A O O E I O A E O

Diru tion dekfoje, aŭ eĉ pli, ĝis vi estas certa ke ĉiu “O” estas identa al ĉiu alia ktp.

Fine, re-enmetu la konsonantojn, kaj rediru la tuton, ĉiam kun la praktikitaj, identaj vokaloj:

EN LA MONDON
VENIS NOVA SENTO

Kaj denove:

U E O O U U I A O O (dekfoje!)

NUN DE LOKO FLUGU
ĜI AL LOKO

Vi miros, kaj viaj gesamideanoj ankaŭ miros, pri la ŝajne subita pliboniĝo en via elparolo!

Vizito al la insulo Pari

KAM LEE (HOBART)

Frumatene grupo de esperantistoj kaj mi forlasis la marhavenon de Ĝakarto per pasaĝera boato al la insulo Pari kiu situas nordokcidente je 40 kilometroj. Signifa momento dum la unua etapo de la veturo estis vido de la rimarkindaj turoj Green Bay Pluit kiuj troviĝas sur la Ĝakarta marbordo. Ili estas kvar apudaj 48-etaĝaj konstruaĵoj altaj je 208 metroj, konstruitaj en 2015. Pluit estas administra centro en Penjaringan en norda Ĝakarto.



Foriro el Ĝakarto. La plej alta konstruaĵo estas unu el la kvar konstruaĵoj de Green Bay Pluit. Atesto de moderna Ĝakarto, ĉu ne?



Mia unua naĝo en la akvoj de Indonezio.
Certe estis feria atmosfero.



Plaĝo de Virga Sablo: povas esti bildo de paradizo, ĉu ne?

La pramŝipo veturis proksimume du horojn sur la trankvila Maro de Javo kaj poste ni alvenis al la malgranda komerca kaj turista marhaveno de la insulo Pari. La marhaveno situas ĉe la suda flanko de la insulo kiu formas parton de la grupo de insuloj Pulau Pari. La insulo Pari estas bananforma, longa je 2,6 kilometroj kaj larĝa je maksimume 500 metroj.

Ni piediris du cent metrojn al nia loĝejo, unuetaĝa konstruaĵo. Laborantoj liveris per ĉareto niajn pakaĵojn. Verŝajne ne estas multaj aŭtomobiloj sur la insulo. Mi sentis ke mi estas en kaj fremda loko kaj en epoko de la 1950-jaroj.

Ni piediris du cent metrojn al la

bela Plaĝo de Virga Sablo, konata plaĝo sur la norda flanko de la insulo. Estas malfacile pruvi ke la sablo estas virga, sed ĝi certe estas bela. Ondoj mankas kaj oni povas vidi malproksime mangloarbojn kaj la trankvilan maron. Mi ĝoje naĝis en la varma akvo. Mi ne vidis fiŝojn en la akvo, sed amiko rimarkis grandan longan marbeston kiu verŝajne estis longega angilo.

Grupa konversacio en Esperanto okazis en interesa izolita kabaneto. Bona oportuno por fari ĝojan grupfoton, ĉu ne? Rimarkinda estis la ĉeesto de aliaj grupoj de alilandaj turistoj kiuj ankaŭ ĝuis la plaĝan atmosferon kaj agrablan veteron.



Dum konversacio en la kabaneto



Grupo de esperantistoj en boatekspurso ĉirkaŭ la insulo Pari



Fiŝkaptisto sur malgranda boato. La akvo estas sufiĉe malprofunda, tiel ke li povas uzi longan stangon por movi la boaton.

La sekvan tagon mi partoprenis en boatekskurso ĉirkaŭ apudaj insuloj. Ni vizitis specialan parton de la maro kie multaj malgrandaj fiŝoj videblis. De tempo al tempo ni vidis fiŝkaptistojn kiuj kaptis fiŝojn per uzo de reto laŭ tradicia metodo. Unu el la insuloj kiun mi vidis en la distanco havis grandan luksan hotelon. Verŝajne temis pri investado en la turista merkato por allogi riĉulojn. Kelkaj el la insuloj en ĉi tiu regiono estas posedaĵoj de

individoj. Ni vidis delfenojn dum nia reveno al la marhaveno de Pari.

Posttagemeze, ni bikciklis laŭ vojetoj al diversaj partoj de la insulo. Ni vidis domojn, malgrandajn butikojn, lernejon, moskvon ktp. Ni vizitis marbordan sciencesploran centron kaj ni piediris laŭ la apuda kabo kaj rifo. Ni vidis multajn malgrandajn krabojn. Se iu proksimiĝas, tiuj bestoj povas palpi la movadon de la tero kaj ili rapide eniras en siajn plaĝajn truetojn. Dum la nokto, ni ĝoje vespermanĝis kaj festis la finon de trankviliga ferio sur la insulo. Starante sur la marbordo, oni povis vidi la urbajn lumilojn de moderna Ĝakarto malproksime.

La sekvan tagon mi kaj aliaj esperantistoj kun freŝa energio revenis pramŝipe al Ĝakarto. La ekskurso al la insulo Pari certe estis memorinda travivaĵo.

Sur la antaŭa parto de la ŝipo kiu revenas al Ĝakarto. Vizito al la insulo Pari sukcesis!



La sekretaj florkoloroj

MARIE ELLIOTT (AUCKLAND)

La novjara soleno. Iuj nekonataj homoj inter aliaj. La plej konataj: mia koramiko, lia bonamiko, kaj unu aŭ du amikoj. Sed krom tiu ĉi areto, arego tute ne ĝis tiam vidita kunvenis ĉe malnova, strangeta domo. Kun kiu mi povas paroli? Ĉu mi eĉ povas? Aŭ ĉu mi nur emas sidi aparte, ĉar certe neniam scias kion diri? Malgraŭ la situacio kaj la demandoj de nesociema menso, mi iris por kunsidi kun kaj la areto kaj la arego, kaj min konsilis ke aŭskultado estus plej bona. Ni iris eksteren al bela ĝardeno, kaj sidiĝis sur benkoj. Kiam mi iomete povis teni min komforte, mi komencis ĉirkaŭrigardi.

Blankaj rozoj kreskis belele inter arbustoj. Koloraj sen koloro estis ili, lunsimilaj antaŭ la malheleco. Sed kio ja ekzistis inter la ombregoj? Kiaj rampaĵoj kaj sonĝbestoj timigaj restis tie, atendante nesingardeman ulon por kapti kaj manĝaĉi? La floroj, nur tiuj rozoj, brilis kiel la luno kaj gardis nin kiel la suno kontraŭ la nuba, nigra nokto.

Sed jen! El lumilaro projekciiĝis blua lumo ĵetita al la tuta ĝardeno, kovrante ĝin kaj igante ĉion nigra, malhela, eĉ la rozojn helbluaj. Tiel la terpeco estis ŝanĝita. La rozoj povis lumi! Kaj jen denove! La lumo el la lumilaro iĝis kaj blua kaj verda, malkaŝante aliajn florojn inter la arbustoj. Novaj flavaĵoj kiel leontodoj staris sur iliaj branĉetoj kaj ŝajnis atingi la stelojn. Apude, malantaŭ la rozoj, klinetis bluaj trumpetoj, tute ĉarmaj. Kaj la folioj ekverdiĝis! Tiel feliĉe!

Tiel brilante! Rampaĵoj rampetis pli malproksime kaj ĉagreniĝis pro manko da homa timo.

Sed nek la blua nek la verda lumo malkovris la kolorojn de la ĝardeno kiel la sekva lumilaro, la lumo plej belega. Samideano kara, estis nia malo, estis la koloro ruĝa! Kiel fajro dum la somero ĝi briligis la florojn kiuj tre sekretis ĝis nun! Sur la plej malinteresaj ombrujoj, sur preskaŭ ĉiuj arboj starantaj ĉe la ĝardenolimo, pompaj kaj venkaj fajreroj tondis la aeron kaj varmigis la venton ĉirkaŭan. Ĉiuj bestaĉoj el tiaj timigaj sonĝoj de la homaro subite iris for el niaj mensoj. Mi estis tiel ĝoja kiel infano, kaj ekstaris por turni la kapon de loko al loko. Miregis mi. Tute miregis la floroj, la lumoj, kaj miaj okuloj ekiĝis grandaj dum la lumŝanĝado tiun nokton.

Kaŝita. Malkaŝita. Blua kaj malhela kaj ruĝa kaj verda. Estis kiel magia ĝardeno de la feinoj amuzemaj! Mi diras al vi ke mi antaŭe tute erare parolis pri la ĝardeno ĉar ĝi ne estis bela. Ĝi estis belega, potenca, kaj akvo kaj fajro samtempe. Estis ĝardeno de mirindaĵoj kaj mi tute ne sciis ĉu mi eĉ povas foriri poste. Eble mi estus restinta inter la lumoj ŝanĝantaj dum la tuta nokto. Sed ho leganto, vi estas homo kiel mi, kaj vi scias ke, kiel lumoj, ĉio devas ŝanĝiĝi iam, malkaŝante la bonaĵojn de la viv'.

(Rimarko de la redaktisto: Marie estas nova, juna lernanto de Esperanto. Ni gratulas ŝin pro ŝia ege bela kaj altkvalita kontribuo.)

Onklo Adolfo aŭ Gak til myren og bliv viis!

BOB FELBY (ADELAIDE)

Nu, mi bone komprenas se laŭ via opinio “Gak til myren og bliv viis” signifas nenion al vi. Sed al mi, kiu naskiĝis en lando, verŝajne la plej malnova lando en la mondo kun reĝa familio, tio signifas multon. La lingvo estas treege malnova, sed escepte de unu vorto, mi komprenas ĉiujn el ĝiaj vortoj! La signifo eble signifas nenion al vi, sed al mi, kaj al miaj multaj geamikoj, ĝi ankoraŭ havas signifon.

Sed mi petas vin, ne jam maltrankviliĝu pri tiu signifo. Ĝi evidentiĝos iom pli poste en la rakonto. Ĉi tiu momento ne estas la ĝusta momento!

Kvankam mi tre ŝatas kaj preferas resti hejme, mi ŝatas ankaŭ pasigi iom da tempo eksterdome. Tial mi certigas ke mia ĝardeno ĉiam estas en bona ordo kaj belaspekta. Mi aranĝis en ĝi belegan lokon kie mi kaj mia hundo povas sidi kaj manĝi kaj trinki. Kaj tion ni ofte faras, precipe kiam la vetero tion permesas.

Mi ĉiam donas iom da manĝaĵo al mia bonega hundo. Ĝi estas bonega laŭ mia opinio, sed supozeble miaj genajbaroj havas tute aliajn opiniojn. Sed mia devo estas ja ami la al mi donitan hundon, ĉu ne? Mi devas ja ami ankaŭ miajn genajbarojn, sed ili devas ja ami ankaŭ min – kaj kompreneble ankaŭ mian hundon!

Do, kiel vi jam scias, mi kaj mia hundo ofte sidas ekstere en la ĝardeno manĝante kaj trinkante. Neniu el ni trinkas, kvankam ni estas ja ankoraŭ aŭstralianoj, alkoholon. La hundo

trinkas akvon sed mi miksas la akvon kun teo aŭ kafo. Tia mi estas, tute ne perfekta – precipe ne laŭ la ĝenerala opinio de homoj naskitaj en Aŭstralio!

Sed, malgraŭ la ideoj de la hundo, mi tre ŝatas dividi mian manĝaĵon kun miaj amataj genajbaroj. Ne kun tiuj kiuj loĝas apude de mi plendante pro la bruo kaj bojado de mia amata hundo, sed kun tiuj kiuj flugas super nia ĝardeno kaj domo. Krom doni panon al tiuj niaj flugantaj geamikoj, mi ne forgesas tiujn aliajn kiuj eble bezonas helpon multe pli ol la birdoj, nome la multajn insektojn kiuj loĝas baraktante por la vivo sub niaj piedoj.

Manĝante panon mi do preskaŭ neniam forgesas ke estas mia devo zorgi ankaŭ pri tiuj niaj preskaŭ plej etaj geamikoj, la formikoj. Precipe kiam mi manĝas panon kun mielo aŭ konfitaĵo, mi neniam forgesas ĵeti iom al tiuj niaj malgrandaj amiketoj. Ankaŭ ili rajtas ja ricevi la panerojn de sur la tabloj de la riĉuloj, ĉu ne? Ĉar nun ankaŭ mi estas riĉulo, kia surprizo, eĉ por mi! Bonvolu ne sciigi la politikistojn ke mi estas tre kontenta pri mia vivo. Mi riskus morti pro malsato aŭ manko de kuracisto se ili sciis tion!

Nu, iun belan tagon kiam la suno brilis, tio tre ofte okazas tie kie mi kaj mia hundo loĝas, mi sentis akran doloretan sur mia nuda piedo. Mi rigardis malsupren kaj vidis unu el la plej belaj, etaj amikemaj formikoj. Ĝi ridetis al mi dirante: “Pardonu min, mi tute ne deziras ĝeni vin, sed vi

aspektas tiom amikema ke mi ekdeziris ekkoni vin iom pli bone. Mi dankas vin ĉar vi ĉiam certigas ke ni, viaj plej proksimaj genajbaroj, neniam devas enlitiĝi malsataj”.

Mi demandis al la eta amiko: “Kiu vi estas kaj kiel vi nomatas?” “La aliaj formikoj nomas min Onklo Adolfo,” diris la aminda etulo. “Kaj ankaŭ vi rajtas nomi min onklo Adolfo, tio estis mia nomo, kiam mi antaŭ longe, fakte antaŭ 72 jaroj, vivis sur tiu ĉi planedo kiel tiel nomata homo. Sed tiam mi tute ne meritis esti nomata homo. Mi estis egoisma kaj malamata de ĉiu deculo. Mi fakte estis diktatoro kaj komencis militon en la tuta mondo. Mi estis aŭstro kaj provis konvinki la germanojn ke kune ni povos facile konkeri la tutan mondon. Retroenpensante mi hodiaŭ miras kial mi mem povis kredi ion tiom frenezan. Ankaŭ mi konsentas kun Zamenhof ke la tuta mondo iom post iom iĝos unu granda regno parolanta la saman lingvon. Ĝi havos nur unu registaron, neniujn policianojn kaj neniujn armeojn, ĉar tiaj tiam ne plu bezonatos. Verŝajne ankaŭ malliberejoj ne plu ekzistos, ĉar neniuj tiam krimemos. Mi supozas ke ankaŭ malsanulejoj tiam ne plu ekzistos, ĉar perfektaj homoj ne malsaniĝos. Kaj, granda ĝojo por la infanoj, ankaŭ lernejoj ne ekzistos.”

Nu, tio estis al mi malfacile kredebla. Tiu ĉi planedo estas ja kaj lernejo kaj malliberejo. Neniu dubo pri tio. Tiuj el ni, kiuj fine ne plu bezonas lernejojn, malsanulejojn kaj malliberejojn, ne plu revenos ĉi tien. Estas skribite en la angla Biblio ke “en la domo de mia Patro estas multaj domegoj, estas ankaŭ unu por vi”. En aliaj Biblio de la mondo estas skribite: “en la regno de

Dio estas multaj loĝejoj”, do neangloj ne loĝos en domegoj!

Daŭrigis Onklo Adolfo: “Jam nun la homoj ekkomprenas ke ili konsistas el unu grandega familio. Tio estas la granda plano de la Providenco. La homaro ne estos multe da etaj grupoj, kiuj devas malami kaj detrui unu la alian. La celo estas ke ĝi devas ami kaj subteni unu la alian. Tial jam nun ĝi komencas vidi kaj ami unu la aliajn. Koloro de haŭto, filozofio, kaj religio ne gravas. Vi ĉiuj estas unu granda familio Esperanton parolanta. Eĉ ni formikoj parolas Esperanton, same kiel mi ĝin nun parolas kun vi. Ĉu vi ne vidas ke en iu ajn lando en kiu vi vivas estas homoj de malsamaj koloroj kaj filozofioj? Tio estas nur la komenco de la granda interfratiĝo de vi ĉiuj.”

Kaj tiam mi subite kaj tuj ekmemoris la ege malnovan proverbon de miaj pragepatroj. “Gak til myren og bliv viis!”. Tiu populara proverbo simple signifas: “Tru al la formiko kaj saĝiĝu!”

Laŭ mi, la fakto estas ke la pli evoluintaj el ni kompreneble ne revenos ĉi tien. Ili iros pli supren al alia loĝejo, al planedo kie ili povas pli lerni. Ili estas boneguloj kaj meritas tion. Ilia lokon, post kiam ili estos foririntaj, prenas tiuj, kiuj ankoraŭ ne lernis sufiĉe, precipe la plej inteligentaj bestoj renaskiĝos ĉi tie kiel homoj komencantaj. Tial mi dubas, ĉu iam la vivo sur tiu ĉi planedo estos ideala. Ĉiam estos militoj ktp ĉi tie!

Sed malgraŭ ĉio mi pensis: “Tiu eta saĝulo ja pravas. Certe li travivis multe da malĝojo”. Mi do demandis al li: “Kio do okazis al vi post kiam vi forlasis vian homan korpon?” “Ho”, li diris, “tiam mi tuj ekkomprenis ke, malgraŭ tio ke mi havis la korpon de

homo, mi ja ne agis kiel homo. Mi ne manĝis mortintajn korpopartojn, sed mi tamen kulpas pro mortigado de multaj homoj, precipe judoj, rusoj, poloj ktp. Mi kontraŭis la disvastigadon de Esperanto, kaj fakte agis aĉe kaj kruele. Estis al mi dirate, tuj kiam mi volis eniri la Spiritan Mondon, ke mi havas neniun rajton eniri. Ke mi, pro miaj multegaj pekoj, ne plu rajtas esti homo. Homo estas io kio oni estas nur se oni faras bonon. Mi devis do rekomenci la lecionojn kiujn mi estis forgesinta kiam mi ricevis la materian korpon de homsimila estulo. Iom post iom, post multaj enkarniĝoj mi fine atingis tiun ĉi formon kiun mi nun ĝuas. Mi pentas miajn multajn pekojn kaj fiagaĉojn esperante rapide travivi la ankoraŭ multajn enkarniĝojn kiel fiŝo, birdo, mambesto, kaj espereble baldaŭ homo. Sed verŝajne mi ne vivos tro longe kiel formiko. Baldaŭ mi estos abelo. Tiam mi flugos de floro al floro suĉante mielon. Kiam mi estos homo mi promesas ne plu peki, ne manĝi aliajn vivulojn, ne vesti min per la mortintaj partoj de niaj fidelaj amikoj, la bestoj, sed helpadi ĉiujn. Kaj mi promesas daŭrigi la lernadon de la bela internacia lingvo Esperanto!"

Daŭrigis mia ĵus trovita kaj nova amiko: "Kelkfoje estas malfacile. Kiam la nuntempaj homoj surŝprucas niajn hejmojn per veneno mi estas memorigata pri miaj fiagaĉoj dum mia fiekzistadaĉo kiel tiel nomata. homo. Mi eĉ tre bone, eĉ bonege komprenas, ke estas nur tio kion mi meritas. Mi ja rikoltas nur tion kion mi semis, ĉu ne?"

Refoje mi pensis: "Tiu eta amikema estulo estas ja plena de amo al ni ĉiuj. Kaj vere, ankaŭ li suferis kaj ankoraŭ suferas multon, kvankam li ŝajnis sin, malgraŭ ĉio, feliĉa. La sola solvo

kiun mi povis rapide trovi estis do, ke ni ĉiuj pardonu unu la aliajn por ne ripeti ĉiujn niajn antaŭajn enkarniĝojn. Mi do tuj pardonis tiun etan ĉarman formikon. Neniu bezonas scii kiu li estis antaŭ 72 jaroj? Kaj ankaŭ ni ja ne scias, kiuj ni mem, kaj niaj geamikoj, iam ajn estis! La Providenco saĝe decidis ke por nia progreso estas necese ke ni ne memoru nian pasintecon."

Sed necesas aldoni ke intertempe pasis kelkaj jaroj. Bedaŭrinde pliaĝiĝis mia amata hundeto, pliaĝiĝis ankaŭ mi. Mi supozas, fakte mi estas preskaŭ certa, tute certa, ke ni ĉiuj pliaĝiĝas jaron post jaro. Sed bedaŭrinde mia amata hundeto decidis aŭ eble estis devigata forlasi sian etan ĉarman blankan korpeton. Ankaŭ tio estas tute normala, aŭ ĉu vi havas alian opinion?

Mi ne ĝojis pro tio. Mi malĝojis. Mi sidis tie, en la ĝardeno manĝante kaj trinkante kafon, aŭ ĉu estis teo, mi petas vian pardonon, mia memorkapablo ne plu estas tia kia mi preferus ke ĝi estu. Mankis, eĉ mankegis al mi tiu mia eĉ tre kara kaj amata blanka hundeto. Sed la suno brilis, estis multaj rozoj diverskoloraj en la ĝardeno. Subite miaj malseketaj okuloj rimarkis abelon sur unu el la plej belegaj ruĝaj rozoj. Mi ekĝojis. La abelo turnis sian kapon kaj rigardis al mi. Mi vidis grandan rideton sur ĝia ĉarma vizaĝo. Ankaŭ mi ridetis. Tiam la abelo okulumis al mi per unu el siaj belegaj okuloj, fakte per la dekstra. Tiam mi okulumis al ĝi per unu el miaj ne tiom belegaj okuloj, fakte per la maldekstra, ĉar ĝi estas la plej bona kiun mi havas!

Nun mi sentas min multe pli bone. La vivo daŭras kaj ankoraŭ mi havas amikon!

Miaj internaciaj promenoj

MARJA NIELSEN (WHYALLA)

Estas 29 promenoj en la mondo organizataj de la IML Walking Association. Ok landoj (Japanio, Aŭstrujo, Belgujo, Danio, Irlando, Nederlando, Svislando kaj Luksemburgo) fondis la IML en 1987 en Tokio. Nuntempe ĉiuj tiuj landoj havas multtagajn promenojn, kaj post 1987 multaj aliaj landoj aliĝis al la asocio. La promenoj ne estas konkurso. Oni ne permesas kuri. Ĉiu partoprenanto ricevas medalon se oni alvenas al la fino ene de la permesita tempo.

Mia edzo kaj mi jam faris kelkajn el tiuj promenoj. Ni komencis en 1992 en Nederlando kie estas tre fama promeno, la 'vierdaagse' (la kvartaga promeno) kiu komenciĝis en 1909. Ĉirkaŭ 40 000 homoj partoprenas. Ni ne preparis nin sufiĉe ĉar ni ne sciis kian preparon ni bezonas, kaj pro la pluvo dum la unua tago ni akiris tre dolorajn piedojn. Ni provis la duan tagon, sed ni ne finis la promenon. Post nia unua provo en internacia promeno ni ege volis provi ĝin denove.

Estas ankaŭ internacia du-taga promeno en Kanbero, Aŭstralio. En 2000 ni iris al Kanbero por partopreni en tiu promeno, kaj ni sukcesis. En 2001 ni reiris al Nederlando por promeni denove en la kvartaga promeno. Ĉi-foje ni sukcesis. Nederlando estas tre ebena lando sed la tria tago de la promeno estas la tago de sep montetoj, sed nur por nederlandanoj ili estas montetoj. Estis multaj spektantoj laŭ



Kanbero, je la komenco de promeno

la vojo kun ĉiuj hejmaj komfortoj: tablo, tablotuko, vazo kun floroj kaj teo kaj kafo, kaj ombreloj. Se oni havas ombrelon, la vetero ne estas ĝena. Kelkaj promenantoj havis helpantojn laŭ la vojo kiuj donis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. La lasta tago estis la triumfa marŝo al la fino. La strato nomiĝas Via Gladiola, ĉar gladiolo estas la speciala floro de la promeno. Ni finis la kvartagan promenon kaj ni ege volas provi ĝin denove en aliaj landoj.



Kanbero dum promeno

Ni promenis en Danio, Nov-Zelando, Kanado, Usono, Japanio, Koreujo, kaj Tajvano. Mi promenis ankaŭ en Francio, Irlando, kaj Luksemburgo. Oni demandas al mi kial mi partoprenas en internaciaj promenoj. La respondo estas tre simpla. Estas la etoso kaj la sento inter la promenantoj. La moto de la IML estas: “Nos iungat ambulare” (promenado unuigu nin).



Nederlando, ĉiuj hejmaj komfortoj



Nederlando, la fina triumfa marŝo

Johann Friederich Struensee

BOB FELBY (ADELAIDE)

Mi ne povas ne pensadi pri kio evidente ĉiam okazos al kiuj suferas teruran kaj timigan morton. Kvankam la morto fakte ne ekzistas, mortas ja tamen la materia korpo kiu iasence neniam eĉ vivas. Sed ni ja bezonas iun vorton por ilustru tiun malfacile kompreneblan aferon. Por ne ofendi iun ajn, ni uzu la vorton Providenco.

Providenco decidas kiom da jaroj, monatoj, semajnoj, diurnoj (tagnoktoj), horoj, minutoj kaj sekundoj ĉiu el ni vivu. Ne estas saĝe interveni kun tio. Kiu fideziras kaj fikaŭzas tro fruan morton al iu alia pro sia propra plezuro tiu respondecas pri ties sorto. Kaj ni ĉiuj scias ke ja estas justeco en la tuta universo. Eĉ se la mortonto mem eĉ

tre forte deziregas forpasi tro frue, li aŭ ŝi devos suferi. Nuntempe multaj homoj vivas sub la falsa impresio ke ili rajtas mem decidi kiam kaj kiel ili volas forpasi el sia preskaŭ infera vivo. Sed tio kompreneble ne eblas. Ni ankaŭ ne povas mem elekti kiam ni deziras renaskiĝi. Nia vivo estas antaŭprogramita por ni, ĝi estas leciono kiun ni devas lerni, ĉar ni en antaŭa(j) vivo(j) montris ke ni tute ne komprenis aŭ eĉ rifuzis kompreni la plej gravajn aferojn kaj lecionojn de la vivo.

Do Struensee, kiu en la mondo estas Struensee? Mi aŭdas vin demandi, ankoraŭ nun, pli ol 200 jarojn post lia kruela suferado. Li estas nek en la spirita mondo nek sur la Tero, sed ie inter tiuj du lokoj, ĉiuminute memorante tion kio okazis al li, kaj nenio aŭ neniu permesas al li tion forgesi. Kaj li estas nur la viktimo de la stulteco de aliaj.

Sed unue mi respondos al via demando pri kiu Struensee estis aŭ estas. Struensee estas bonegulo naskita la 5-an de aŭgusto 1737 en Halle an der Saale, Reĝlando de Prusujo, tiam apartenanta al Danujo, nuntempe al Germanujo. Interesa homo, kiu ne havis edzinon, sed tamen filinon.

Struensee estis germana kuracisto. Li iĝis la kuracisto de la mense malsana Reĝo Kristiano 7-a de Danujo. Tiu estis mense malsana verŝajne pro la kruela traktado fare de siaj gepatroj kiam li estis infano. Iom pli poste Struensee iĝis membro de la dana registaro kaj poste li havis eble tro multan povon kiel regento de la lando en kiu li provis plibonigi la vivkondiĉojn de la dana

popolo. Lia amafero kun la Reĝino Karoline Matilda kaŭzis skandalon, precipe post la naskiĝo de la filino, Reĝidino Louise Augusta.

Li estis la tria el ses infanoj de la pietista teologo kaj pastoro Adam Struensee kaj lia edzino Maria Dorothea. Johano Frederiko Struensee eniris la Universitaton de Halle en 1752 kiam li estis 15-jaraĝa. Tie li studis medicinon, li estis tre sukcesa kaj iĝis doktoro de medicino en 1757. La universitato malfermis liajn okulojn al la “aĝo de kompreno” kiel ankaŭ al sociaj kaj politikaj kritikoj kaj reformoj. Struensee konsentis kun tiuj novaj ideoj kaj, iĝinte ateisto, li studis la verkojn de Claude Adrien Helvétius kaj aliaj francaj materialistoj.

Lia inteligenteco superis tiun de la plej multaj homoj kaj li estis populara inter siaj samtempuloj pro sia kontraŭdiremo. Li estis ambicia kaj petis monon al la dana ministro pri eksterlandaj aferoj. Li eĉ provis verki artikolojn por ĵurnalo.

Kuracisto de Reĝo Kristiano 7-a

Struensee kontaktiĝis kun aro da aristokratoj. Oni rekomendis Struensee al la kortego kiel kuracisto de Reĝo Kristiano 7-a por kiam li veturos por viziti reĝajn kortegojn en okcidenta Germanujo, Nederlando, Francujo, kaj Anglujo. Struensee ricevis tiun postenon en aprilo 1768. Dum okmonata veturo li gajnis la fidon de la reĝo. La ministroj de la Reĝo ŝatis tion ke Struensee kapablis influi la reĝon kiu rezulte faris malpli da embarasigaj eraroj. Kiam la kortego revenis al Kopenhago en januaro 1769, Struensee estis oficiale nomita

kuracisto de la Reĝo. En majo, li ricevis la honoran titolon de Ŝtatkonsilisto, kio antaŭenigis lin al la tria rango en la kortego.

Ekpotenciĝo

Unue li repacigis la miskomprenojn inter la gereĝoj. Reĝedzino Caroline Matilda unue malŝatis Struensee, sed ŝi estis malfeliĉa edzino, ignorata kaj forpuŝata de la reĝo, kaj kompreneble lia mensa malsano ne igis ŝin feliĉa. Sed Struensee estis unu el nur tre malmultaj kiuj ne ignoris ŝin. Iom post iom ŝia amo al la juna kuracisto kreskis. En printempo de 1770 li iĝis ŝia amanto.

Struensee partoprenis en la edukado de la Kronprinco Frederiko 6-a laŭ la konsiloj de Jean-Jacques Rousseau. Tamen, li ja havis siajn proprajn ideojn pri Rousseau. Li izolis la infanon kuraĝigante lin solvi siajn proprajn problemojn. Fakte, li sekvis la konsilojn de Rousseau tiom stulte ke la Kronprinco surhavis preskaŭ neniujn vestojn, eĉ dum la vintro.

La 5-an de majo Struensee estis nomita reĝa konsilisto. La 15-an de septembro la Reĝo maldungis Kancelieron Bernstorff kaj en decembro Struensee nomumis sin mem maître des requêtes (altnivela oficisto pri leĝo pri administraj aferoj) kaj komencis 16-monatan periodon ĝenerale nomitan la “Periodo de Struensee”. Kiam dum tiu jaro la reĝo eniris mensan torporon, la aŭtoritateco de Struensee estis la plej grava.

Regante la registaron

Unue, Struensee komencis ne tro forte regi la politikan maŝinon. Tamen, jam en decembro li komencis

perdi paciencon kaj li aboliciis la ŝtatkonsilaron. Estis lia oficiala devo prezenti raportojn de la diversaj fakoj de la ŝtato al la Reĝo. Pro la fakto ke la Reĝo tute ne kapablis respondi pri siaj agoj, Struensee diktis kion ajn laŭ sia gusto kaj plaĉo. Li maldungis ĉiujn fakĉefojn kaj la norvegan Vicreĝon. Danke al tio, la kabineto, kun Struensee kiel plej granda povo, iĝis la ununura suverena povo en la ŝtato.

Reformoj kiujn enkondukis Struensee inkludis la sekvajn: Abolicio de torturo. Abolicio de sklaveco. Abolicio de cenzuro de la gazetaro. Abolicio de la praktiko laŭ kiu nobeluloj estis preferataj por ŝtataj oficoj. Abolicio de la privilegioj de nobeluloj. Abolicio de “nemeritaj” profitoj por nobeluloj. Abolicio de reguloj pri konduto en la Reĝa Kortego. Abolicio de la aristokratio, de la Reĝa kortego. Abolicio de ŝtata monhelpo al neproduktantaj negocistoj. Abolicio de pluraj libertagoj. Enkonduko de imposto pagenda de vetantoj kaj luksaj ĉevaloj por helpi trovitajn bebojn. Malpermeso de sklaveco en la danaj kolonioj. Honori per titoloj ktp nur tiujn kiuj vere meritas tion. Li eĉ malpermesis mortpunon al kiuj estis kaptitaj ŝtelante.

Do, ŝajnas ke li estis vera bonegulo, sed iuj en la lando havis tute alian opinion. La fakto ke li neniam parolis nek dane nek norvege ofendis kelkajn, precipe danojn kaj norvegojn. Sed kion alian li povis fari? Esperanto estis ankoraŭ ne inventita. Do, bedaŭrinde lia populareco ekmalaperis!

La 7-an de julio 1771 la reĝino naskis filinon Louise Augusta. La 17-

an de januaro 1772 kiam Struensee, aristokrato Brandt, kaj Reĝino Caroline Matilda dormis en siaj propraj dormoĉambroj, iliaj dolĉaj sonĝoj estis interrompitaj de krueluloj. En la mateno, je eĉ tre grandega ĝojo kaj plezuro de la popolaĉo, oni veturigis la Reĝon tra Kopenhago en ora kaleŝo. La Reĝino estis enkarcerigata en Palaco Kronborg norde de Kopenhago.

La 27an de aprilo 1772 Struensee kaj Brandt estis kondamnitaj perdi unue siajn dekstrajn manojn, tiam siajn kapojn, kaj nur poste esti senintestigataj kaj kvaronigitaj. Struensee sidis pacience atendante en fortikaĵo en Kopenhago. En la mateno do la 28-a de aprilo 1772 venis ĉevaltirata veturilo kaj du krueluloj enpuŝis Struensee en ĝin. Sed, unue oni torturis Brandt. Homoj kriegis pro ĝojo. Tiam venis la vico de Struensee. Unue li devis perdi sian dekstran manon. La mortigisto devis provi tri fojojn antaŭ ol la dekstra mano forlasis la brakon de Struensee. La mortigisto sukcesis pli facile per lia kapo, kiun li tuj poste metis sur longan stangon kaj triumfe montris al la aplaŭdanta homamaso de 30 000 homoj. Nur tiam la mortiginto senintestigis kaj kvaronigis lin.

Tio okazis antaŭ pli ol ducent jaroj, sed tio pensigas min pri tio, ke oni ankoraŭ punas la bonegajn kaj laŭdas kaj honoras la malbonegulojn. Ankoraŭ ne multo, certe ne sufiĉe, ŝanĝiĝis. Tri jarojn poste la Reĝo desegnis desegnaĵon de la hontinda kruelaĵo. Sub la desegnaĵo li skribis: "Ich hätte gern beide gerettet" ("Mi volonte estus savinta ilin ambaŭ!"). Tamen, la bonintenca Reĝo malfruis tri jarojn!

ESK | paĝo 16 | 126 | marto 2017

Tio ĉi estis nur la enkonduko. Nun sekvas la fino de la malĝojiga rakonto. Kaj mi ludas etan parton en ĝi!

Kelkajn jarojn poste, fakte nur 160 jarojn poste, mi naskiĝis. Kiam mi atingis 30 jarojn mi decidis labori – aŭ deĵori – kiel noktogardisto en Kopenhago kaj sukcesis gajni postenon ĉe la dana registaro. Inter alie mi devis de tempo al tempo deĵori dumnokte en la parko Frederiksberg Have. Tiu sama parko apartenas al la dana reĝa familio kaj estas ĉirkaŭata de bariloj. Ili bezonas riparon, sed ni ĉiuj scias kiom elspezemaj niaj registaroj estas. Se temas pri militoj niaj registaroj kun ĝojo donas monon, ĉar militoj estas ilia nesatigebla malsato, sed se temas nur pri barilo, do "ni ne havas tiom da mono!" Nu, nuntempe la parko estas malferma al la publiko, sed nur de sunleviĝo ĝis sunsubiĝo. Post sunsubiĝo la noktogardisto ŝlosas ĉiujn pordojn kaj neniu krom la noktogardisto kaj sia fidela gardhundo rajtas esti ene de la parko.

Kiam oni eniras la parkon oni vidas belegan statuon de Reĝo Kristiano 7-a. Surskribita tie estas "la abolicinto de sklaveco". Amuze, ĉu ne? Li, tiu reĝo, abolicis nenion. Struensee devus havi la honoron kaj la gloron.

Krom tiu statuo troviĝas ankaŭ la Frederiksberga Palaco. Granda flava konstruaĵo, en kiu loĝis germanaj soldatoj de 1940 ĝis 1945. Estis ege amuze por mi kiel knabo iri tien kaj rigardi la soldatojn ekzerci kiel plej bone kaj facile venki la militon. Tie mi aŭdis miajn unuajn germanajn vortojn kaj iliajn germanajn prononcojn. La lingvo sonis ja terure. Sed tamen, ni pardonu ilin. Kiam mi en 1951 biciklis

al Germanujo por viziti germanojn, mi tre baldaŭ trovis ke ilia lingvo fakte estas treege belega.

Krom statuo kaj flava konstruaĵo estas ankaŭ kanalo kun multaj anasoj, anseroj, kaj kompreneble cignoj, kaj eble ankaŭ aliaj birdoj. Ie meze de la kanalo estas insulo. Ĝi nomatas “la Ĉina Insulo”. Sur tiu insulo estas konstruita “Ĉina Dometo” kiun neniu, krom mi, rajtis eniri.

La barilo ĉirkaŭ la parko iras inter la Kopenhaga Bestĝardeno kaj la parko. Proksime al la flava konstruaĵo estas alia enirejo al la parko. Oni eliras el la enirejo, kiu tiam fariĝas elirejo, kaj transiras la vojon. Tie, sur la alia flanko de la vojo troviĝas alia publika parko, preskaŭ sen bariloj. Sed oni neniam fermas kaj ŝlosas tiun parkon. Ĝi estas alirebla por la publiko dum la tuta tago. Oni ne rajtas tranokti tie. Iam mi surprizis 3 skotajn turistojn dormantajn en tendo. Mi vekis ilin kaj klarigis ke tio kion ili faras estas kontraŭ la leĝo de la lando. Ili ridegis, kaj mi diris ke post duona horo estos mateno, do faru kion vi volas. Kaj ni ĉiuj sidiĝis sur benko kaj babilis.

Nu, eble tio ĉi, laŭ via opinio, ne estas inda fino al la vera historio pri Struensee. Do, nun vi atentu.

Iun printempan vesperon, fakte estis la 28a de aprilo 1972, 200 jarojn post kiam la dana registaro fimurdaĉis Struensee, mi biciklis de la stacidomo por deĵori en Frederiksberg Have. Mi alvenis ĉirkaŭ la 17.30-a horo. Mi havis mian propran dometon en la parko kun necesejo kaj kuirejo. Unue mi iris aliloken por saluti mian bonegan amikon Ŝang, granda

germana ŝafhundo kiu ĉiam postulis ke mi kunportu al li ion manĝeblan.

Do, kune ni eliris en la belegan parkon. Estis ankoraŭ multaj parkvizitantoj tie. Multaj kun infanoj kaj ankaŭ multaj kun hundoj. Ni iris viziti ne nur Frederiksberg Have sed ankaŭ la alian parkon trans la vojo. Ĉio ŝajnis esti en bona, eĉ bonega ordo. Ni do reiris al nia propra dometo en la parko. Baldaŭ mallumiĝis kaj mi diris: “Venu Ŝang, ni iru promeni en la parko”. Kaj Ŝang eksaltis kaj ni ambaŭ eliris. Ni eliris el nia dometo, ŝlosis la pordon, kaj ekiris. Baldaŭ ni venis al la piedo de kruta vojo kiu kondukas supren al la flava konstruaĵo. Tiam okazis io kion mi neniam antaŭe rimarkis. La grandega “Preĝejo de Jesuo” trans la vojo eksonorigis siajn sonorilojn. Mi rigardis mian horloĝon. Estis ne tute, sed preskaŭ noktomezo. Mi pensis ke okazas io stranga hodiaŭ ĉi tie. Tiam ĉesis sian funkciadon ĉiuj stratlampoj sur la vojo kaj tri virinoj venis renkonten al mi malsupren laŭ la kruta vojo.

“Bonan vesperon,” diris mi. “Ĉu vi ne scias ke neniu rajtas esti ĉi tie post sunsubiro?” “Ho jes, tion ni eĉ tre bonege scias, sed ĉu vi scias ke hodiaŭ estas la 28-a de aprilo?” “Jes, eble estas la 28-a de aprilo, aŭ estis, ĉar post nur malmultaj minutoj estos la 29-a.”

“Jes, ni estas de la Psika Societo en Kopenhago. Nun, precize antaŭ 200 jaroj oni kruele fimurdadaĉis Johanon Frederikon Struensee en Kopenhago. Li ĉiun jaron iras de la flava konstruaĵo malsupren kaj daŭrigas al la kanalo, de kie li transiras la ponton kaj eniras

la Ĉinan Domon.”

“Ĉu? mi nenion sciis pri tio.” Ŝang komencis spirpeni kaj li tremis, eĉ tremegis. Li ne plu kapablis stari sur siaj kvar piedoj sed kuŝis sur sia ventro sur la malvarma tero. Ankaŭ mi ekfrostis kaj iĝis malvarma, eĉ malvarmega. Ankaŭ la tri sinjorinoj frostis. “Jen li venas,” kriis unu el ili, “li venas rekte al ni”. Mi rigardis, sed vidis neniun. Ŝang estis timigita. Tio ĉi certe ne plaĉis al tiu mia kutime heroa amiko. Kaj mi ne kuraĝis tuŝi lin. La tri sinjorinoj estis ekscititaj. Subite ili diris: “Li estas nun preterpasinta. Li nun survojas al la Ĉina Domo”.

Revenis la stratlumoj kaj la preĝejsonoriloj ĉesis sian sonoradon. Ni kune iris al la flava konstruaĵo proksima al la Bestĝardeno, la tri virinoj foriris, kaj Ŝang kaj mi reiris al Frederiksberg Have, malŝlosis la pordon kaj eniris. Ni iris malsupren laŭ la krutaĵo. Nun fakte estis mia

devo eniri la Ĉinan Domon, sed ial mi decidis atendi ĝis estos la horo por iri hejmen. Ŝang kaj mi eniris nian domon. Poste ni eliris kaj promenis tra la du parkoj, sed nenio malagrabla okazis. Kiam komencis lumiĝi Ŝang kaj mi eniris la Ĉinan Domon. Danke al Dio, ankaŭ tie ĉio estis en bona, eĉ bonega ordo. Mi prenis mian biciklon kaj svingante la manon por adiaŭi la statuon de la Reĝo Kristiano 7-a mi iom pli poste alvenis al la stacidomo.

En la stacidomo atendis min la trajno. Kelkajn minutojn poste ĝi veturigis min 40 kilometrojn al mia hejmo. Je la unuaj 20 kilometroj mi rigardis el la fenestro kaj svingis la manon al Audrey kiu sidis en preterveturanta trajno survoje al ŝia laboro en Kopenhago. Hejmenveninte mi enlitiĝis kaj tre baldaŭ poste endormiĝis kaj dolĉe dormis. Mi estis ja treege laca. Tiel finiĝis alia interesa nokto por mi, ĉu ne?

Soldatoj ĉe palaco en Kopenhago



Poeziece Esperanto venkas

PAUL DESAILLY (WHYALLA)

Jam longan tempon laŭ mi sufiĉe facile estas refuti malicajn mokantojn de Esperanto kies atako celas supozatan senutilecon de la Zamenhofaj idealaro kaj lingvo. Anstataŭ kroniki ties propedeŭtikan valoron, ĝian lern- kaj instrufacilecon, eblecojn per Pasporta Servo amikiĝi kun kamaradoj renkontataj tra la mondo, aliron al sendependaj pensmanieroj kaj magazinoj ktp, mi ilin lakone ridindigas per nerespondebla taktiko kiun bahaano eble ne rajtas uzi. Ne malŝparu viajn vortojn por klarigi la justecon de la Internacia Lingvo al cinikulo kiu 'konas la prezon de ĉio kaj la valoron de nenio.' (laŭ Oscar Wilde) Per simpla demando niaj mokantoj estas silentigataj aŭ kolere ili elbuŝigas repuŝe stultaĵojn. Problemo tamen eble leviĝas ĉar la jena demando povas perdiĝi por ĉiam eventualan samideanon: "Diru,

aparte por junuloj en la ĉambro, kiel ni taksu vian personan opinion kontraste al abundaj laŭdoj de elstaraj pensantoj, sciencistoj, filozofoj kaj altruistoj en ĉiuj generacioj de kiam doktoro Zamenhof iniciatis Esperanton en 1887"? Ne necesas ĉi tie listigi nomojn de niaj famaj subtenantoj ĉar vi konas ilin.

Antaŭ 15 jaroj kiam ambasadoro Ralph Harry de Aŭstralio al mi donacis stokon grandan da *Esperanto*, la fama revuo, mi ekkonstatis la profundan genion kaj flekseblecon de nia mirinde benita lingvo en la gravaj sferoj de la belliteraturo, aparte en ties pinto, la klasika poezio. Kio okazas ĉe niaj kontraŭstaruloj aŭdinte (se ne agnoski!) per la propraj oreloj melodiajn tradukojn de William Auld kaj Kalman Kalocsay troveblajn sur paĝoj 3-8 de Esperanto en 1960:

L'Albatros - Charles Baudelaire

Souvent, pour s'amuser, les hommes d'équipage
Prennent des albatros, vastes oiseaux des mers,
Qui suivent, indolents compagnons de voyage,
Le navire glissant sur les gouffres amers.
À peine les ont-ils déposés sur les planches,
Que ces rois de l'azur, maladroits et honteux,
Laissent piteusement leurs grandes ailes blanches
Comme des avirons traîner à côté d'eux.
Ce voyageur ailé, comme il est gauche et veule!
Lui, naguère si beau, qu'il est comique et laid!
L'un agace son bec avec un brûle-gueule,
L'autre mime, en boitant, l'infirme qui volait!
Le Poète est semblable au prince des nuées
Qui hante la tempête et se rit de l'archer;
Exilé sur le sol au milieu des huées,
Ses ailes de géant l'empêchent de marcher.

La Albatroso - Esperanta traduko de K. Kalocsay

Kelfoje, por amuzo, ŝipanoj kapt-akiras
Albatrosojn, ĉi grandegajn ventbirdojn de la mar'
Kiuj, indiferentaj vojaĝkunuloj, iras
Post ŝip' glitanta super amara abismar'
Apenaŭ ili estas metitaj ŝipoplanke,
Ĉi reĝoj de l' lazuro, mallerte kaj kun ĝen',
Grandajn flugilojn blankajn jen trenas ambaŭflanke,
Kiel remilojn pezajn, kun kompatinda pen'
Ĉi vojaĝant' flugila inerte nun hezitas.
Ĵus nura bel', kaj nune: malbel' komika jam.
Jen, iu ĝian bekon per kurba pip' incitas,
Alia ĝin, fluginton, imitas dum la lam'.
Similas la poeto al tiu princ' de l' nuboj,
Kiu la ŝtormon ĝuas, kaj ridas je l' pafant',
Kaj kiun, tere, sube, ĉe mokrideg' de buboj,
Malhelpas iri ĝiaj flugiloj de gigant'.

The Tiger - *William Blake*

Tiger! Tiger! Burning bright
In the forests of the night,
What immortal hand or eye
Could frame thy fearful symmetry?
In what distant deeps or skies
Burnt the fire of thine eyes?
On what wings dare he aspire?
What the hand dare seize the fire?
And what shoulder, and what art,
Could twist the sinews of thy heart?
And when thy heart began to beat,
What dread hand? And what dread feet?
What the hammer? What the chain?
In what furnace was thy brain?
What the anvil? What dread grasp
Dare its deadly terrors clasp?
When the stars threw down their spears,
And water'd heaven with their tears,
Did he smile his work to see?
Did he who made the Lamb make thee?
Tiger! Tiger! Burning bright
In the forests of the night,
What immortal hand or eye
Dare frame thy fearful symmetry?

La Tigro - *Esperanta traduko de William Auld*

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?
En kia fundo aŭ ĉielo
Ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?
Per kiaj ŝultro kaj kompreno
Por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsas batoj koraj,
Kiaj pied' kaj mano gloraj?
Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
Spiti al terur' ambosa?
Kiam steloj sin malmarmis
Kaj sur la ĉielon larmis,
Ĉu la verko al li karis?
Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?
Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝus kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

La Esperantaj tradukoj ofte estas forme kaj vorte tre proksimaj al la originaloj kaj sukcesas reprodukti ties ideojn kaj bildojn, preskaŭ nenion propran aldonante. La ĉi-supraj specimenoj de la tradukarto redonas la larĝan sencon kaj mem legiĝas poeziece.

La celo de Auld, li diris, estis indiki la gravan rolon kiun Esperanto jam komencis ludi, kaj iom post iom pli amplekse ludos, kiel pontlingvo, kaj tute speciale kiel literatura pontlingvo inter ĉiuj popoloj.

静夜思

床前明月光，疑是地上霜；
举头望明月，低头思故乡。

Dum nokto kvieti de Li Bai - *Esperantigis: William Auld*



Mi vidis lunlumon antaŭ kanapo mia:
ĉu frosto kovras la teron?
Mi levis la kapon, rigardis sur monto la lunon.
Mi klinis la kapon,
kaj pensis pri hejmo lontana.

Ni estu memstaraj juĝantoj laŭlonge de la vojo de senlima beleco – ĉu originalaj ĉu tradukitaj poemoj. Temas ekzemple pri mogola imperiestro de antaŭ proksimume kvar jarcentoj. Akbar la Granda (1542–1605) estis Islamano kiu toleris kaj respektis ĉiujn religiojn. Konsekvence, paco kaj feliĉo abundis tiam en norda Barato. Honore al amata edzino, Mumtaz-i-Mahal kiu mortis kvardek jaraĝa en 1631 dum akuŝo por

la dekkvara fojo, maŭzoleon tie en Agra konstruigis Ŝah-Ĝahan, nepo de Akbar. La Taĝ-Mahalo laŭ multaj homoj estas la plej bela konstruaĵo en la mondo. Situas apude en Nov-Delhio arkitektura rivalo, supozata esti nekonstruebla, kiu tamen spegulas vizion de barono Tennyson kiu je la zenito de sia saĝeco verkis en sia mortojaro Akbar's Dream (La Ŝonĝo de Akbar).

Well I dreamed
That stone by stone I reared a sacred fane,
A Temple, neither Pagod,
Mosque nor Church,
But loftier, simpler,
Always open-doored
To every breath from heaven,
And Truth and Peace and Love and Justice
Came and dwelt therein.

Mi sonĝis,
Ke ŝton-post-ŝton' mi konstruis sanktan Adorejon,
Templon nek Pagodon,
Moskeon nek Preĝejsimilan,
Sed pli altan, pli simplan, ĉiam
Malfermitan al ĉia spiro ĉiela,
kaj ke Vero kaj Paco kaj Amo kaj
Justeco venis kaj ekloĝis tie.



La lotus-templo bahaa ĉe Nov-Delhio, Barato kaj apude la Taĝ-mahalo: konata kiel 'marmora sonĝo en Agra', 'larmero sur la vango de l'tempo'

Por tra Ĉinujo dum dek jaroj pruvi interalie tiel nomatan ne pruveblan aserton ke 'artefarita' lingvo, ĉikaze Esperanto, egalas belsonecon de originalaj poemoj mi multkiale elektis baronon Tennyson. Ĉu mi pli ol anekdote sukcesis ankoraŭ estas ŝvebanta demando. Kiel ajn tio estas, survoje de tiu dorna pado por tiuj sen la ĉina lingvo, mi plukis el tiu fascina landego ties plej belan rozon, mian etan Velanta al kiu cetere estas alte

taksataj Esperanto-tradukoj el Li Bai, la renoma poeto de la dinastio Tang. Krom Ŝekspiro, Tenisono probable estas la plej fama poeto de la brita epoko ĉar li iĝis lordo de la regno kaj poeto premiita dum ĉirkaŭ du generacioj, de 1850–1892. Li estis poeto imperia de Reĝino Viktorio (1819–1901), siavice laŭ multaj historiistoj la plej potenca reganto en la mondhistorio, gajninta kiel dekkelkjarulino la tronon en 1837.

Flower in the Crannied Wall - Alfred Lord Tennyson

Flower in the crannied wall

I pluck you out of the crannies.

I hold you here, root and all, in my hand.

Little flower – but if I could understand

what you are, root and all, and all in all

I should know what God and man is.

Floro en Fendita Muro - Esperantigita de Lidia Zamenhof

Floro en fendita muro

Mi ŝiras vin el la fendo,

Tenas vin, tutan kun la radikoj en mano.

Floreto – sed se mi komprenus

kio vi estas, viaj radikoj kaj ĉio, kaj ĉio en ĉio,


mi scius kio estas homo kaj Dio.

Angleparolantaj esperantistoj faras ravan pretendon ke al la beleco de la originala poemo la Esperanto-traduko fare de Lidia Zamenhof pli ol egalas.

Por pli da informoj bv. turni vin al mia elektronika libro jene:

http://bahai.uga.edu/Realigas_la_Mondan_Pacon.pdf

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6655>



Barono Tennyson (1809-1892)

Aŭskultu Esperanto-muzikon

JOANNE JOHNS (MELBOURNE)

Se vi aĝas pli ol 30, vi verŝajne memoras almenaŭ tri diversajn manierojn por aĉeti kaj aŭskulti muzikon. Nun estas eĉ pli nova, facila kaj ekonomika maniero por aŭskulti grandan kolekton de Esperanto-kantoj.

La abonklubo de Vinilkosmo, je la plej malmultekosta nivelo, donas al vi unu jaron de reta aŭskultado de sia tuta katalogo kontraŭ nur 10 €. Vi povas aŭskulti kion vi elektas per elsendfluo ĉe la retejo 1Dtouch, platformo kiu donas al la artistojn kvardekoble pli ol similaj platformoj kiel Spotify.

Kontraŭ pli da mono oni povas ricevi kaj la abonon kaj diversajn aliajn aferojn, inklusive de bitaj aŭ fizikaj albumoj, gluetikadoj kaj ĉemizoj.

Aliĝu nun ĉe <http://www.vinilkosmo-mp3.com/en/vinilkosmo-abonklubo.html>

ESK | paĝo 22 | 126 | marto 2017



Anonco:

Ni ricevis kompaktdiskon de regeomuziko 'Kreativa' de Jonny M, germana kantisto. Ĉu iu volas ricevi la diskon por verki recenzon? Ni ankaŭ havas diskon en la germana lingvo. Bonvole kontaktu esk2@esperanto.org.au



Kongreso en Brisbano

PETER JOHNS (MELBOURNE)

En januaro mi ĉeestis la aŭstralian kongreson de Esperanto kaj somerkursaron en Brisbano. Tie estis ankaŭ homoj de Francujo (la plejmulto de eksterlandanoj estis de tie!), Indonezio, Nov-Zelando, kaj de diversaj ŝtatoj de Aŭstralio.

La vetero estis varma kaj humida, kaj daŭre sunplena, kio ebligis nin ĝui diversajn ekskursojn dum la kongreso. La unua ekskurso estis vespera boatvojaĝo por vidi la lumojn de la urbocentro.

Ĉi tiu okazis dum tre afabla vespero sed mi mistrafis la belan promenadon al

la pramhaltejo ĉar mi veturigis kelkajn homojn kiuj ne povis promeni. Mi atendis kun ili ĉe la pramhaltejo, kaj baldaŭ la promenanta grupo alvenis krom unu persono, kiu malfruetis pro la bezono uzi la monmaŝinon. La granda plimulto de la kongresanoj trafis



La dua grupeto surpame


la venontan pramboaton, sed kelkaj restis por atendi la malfruulon, ĉar neniu estu forlasita!

La dua grupeto, trovinta sian atenditan anon, ĝuis pli mallongan boatvojaĝon al Southbank, kaj realiĝis al la alia grupo survoje hejmen.


Nia tuttaga ekskurso inkluzivis vojaĝon al la Lone Pine Koala Bestparko (kie ni piknike tagmanĝis kaj vidis multajn aŭstraliajn bestojn), Mt Coot-tha videjo, la botanikaj ĝardenoj, Kangaroo



Peter Williamson trovas novan amikon



Dormema koala



Mia edzino devigis min fari ĝin.

Jonathan kaj Nicole komparas siajn altecojn; exploremaj homoj; Helen kaj Sandor pozas por foto; Brisbano vidita de Mt Coot-tha.






Junuloj ĉe la artgalerio

Point krutaĵoj, kaj Southbank. Mi ĝuis reviziti la lokojn kiujn mi memoras de mia loĝado en Brisbano antaŭ kvin jaroj.

Alia ekskurso estis al la artgalerio. Jonathan Cooper lerte parolis pri kelkaj artaĵoj por doni al ni pli profundan komprenon pri ili, kaj poste kelkaj el ni kafumis antaŭ ol ni revenis al la kongresejo.

Dum la kongreso okazis interesaj prelegoj pri diversaj temoj kiel arto,



Andrew gvidas ridigajn ekzercojn; ĉiuj ridas

birdnomoj, politiko, la okcitana lingvo, fontplumoj, indiĝenaj zonoj en Aŭstralio, Esperanto-muziko, kaj multe pli!


La plej interaga estis tiu de Andrew, kiu gvidis ridigajn ekzercojn. Tio estis tre amuziga speco de terapio.



Marie prelegas pri la lingvo Toki Pona

Kontraŭa pago (supre maldekstre ĝis malsupre dekstre): Jennifer kaj Alan Bishop estas honorigitaj; Linda kantas dum la Kvinslanda vespero; Madeline kaj Jo teumas; la mondo en la ĝardenoj de Internacia Domo; Trevor rolas kiel Donaldso Maktrump en teatraĵo; oni blovas bobelojn dum la kvinslanda vespero; grupo ludante "Mysterium" dum la ludvespero; Kam, Marie kaj Erlangga en teatraĵo; Erlangga parolas pri indoneziaj pupoj

Jennifer & Alan Multa Dankojn



La vesperoj estis plenaj de distraĵo - estis tri teatraĵoj, muziko, karaoko, dancado, kvizo, ludvespero, kaj la kutima aŭkcio.

Dum la matenoj mi partoprenis la Esperanto-kurson instruatan de Franciska Toubale. Ĉiu klaso komenciĝis per “vekaj ludoj” - paroligaj ekzercoj kun fizika parto por prepari nin por la lernado. Ĝi estis bona kurso kaj klarigis kelkajn aferojn, pri kiuj mi estis antaŭe necerta.

Dum la vespero je vendredo, ni iris al la ĉefa strato por piedirantoj, kie ni prezentis koncerton al la publiko por reklami Esperanton. La kongresa koruso kantis, JoMo koncertis kaj dancigis ĉiujn, kaj kelkaj homoj parolis pri kial Esperanto estas grava al ili.

Ni disdonis multajn broŝurojn al la preterpasantaj Brisbananoj, kaj laŭ mi estis bona maniero por reklami la lingvon.



Rouan parolas pri Esperanto



Kongresanoj kantas

JoMo dancigas ĉiujn



La jukatana regiono de Meksikio

DAVID RYAN (WELLINGTON)

La jukatana regiono (en hispana: Yucatán) troviĝas en la sudorienta parto de Meksikio norde de Gvatemalo kaj Belizo. Antaŭ la alveno de la hispanaj konkerantoj ĉi tiu regiono estis hejmlando de la majaoj dum aztekoj estis la ĉefa popolo en multaj aliaj regionoj de la nuna Meksikio.

Ĉi tiu regiono de Meksikio estas

tre varma kaj, pro tio, la vivo estas pli trankvila. Turismo havas grandan rolon. La ĉefaj urboj estas Mérida kaj Cancún. Cancún estas ĉefe turisma loko kiu multe kreskis en pasintaj jardekoj. Precipe usonanoj, kanadanoj, kaj eŭropanoj vizitas ĝiajn luksajn hotelojn.

Oni ofte pagas per usonaj dolaroj kaj ne necesas paroli la hispanan. Ĝi

Malnova preĝejo kaj monaĥinejo en eta vilaĝo kun 4 000 enloĝantoj: ŝajnas ke preskaŭ ĉiuj malgrandaj vilaĝoj havas imponan religian konstruaĵon



Supre: Malnova domo en Mérida laŭ franca stilo: multaj estas nun bedaŭrinde forlasitaj kaj eksterlandaj vizitantoj aĉetas ilin por moderna renovigo



Dekstre: Katedralo de Mérida konstruita dum la 16-a jarcento

similas iomete al Surfers Paradise, sed pensu multoble pli grande – Cancún estas grava internacia turisma loko kaj la flughaveno, la dua plej granda de Meksikio, estas neimageble grandega kun rektaj flugoj el/al Usono, Kanado, Eŭropo, kaj sudamerikaj urboj kiel, ekzemple, Buenos Aires.

Male, Mérida estas granda urbo (pli ol 1 miliono da enloĝantoj) sed ne sur la marbordo. Ĝi gravas ankaŭ laŭ turisma perspektivo sed taksisoforo diris al ni ke usonanoj ne ofte vizitas Mérida ĉar ili preferas la plaĝojn, trinkejojn, kaj dancejojn de Cancún. Mérida estas pli interesa laŭ historia kaj kultura

vidpunkto. Mérida estas tre malnova urbo, fondita en 1542. En pasintaj jarcentoj la urbo estis tre prospera kaj riĉaj komercistoj konstruis grandajn domojn, ofte laŭ franca stilo. La urbo estas vizitinda ĉar oni trovas multajn belajn konstruaĵojn kaj tre grandan katedralon.

Ĉie en la jukatana regiono oni trovas vilaĝojn kun belaj, malnovaj preĝejoj kaj eksmonah(in)ejoj. Ankaŭ estas multaj piramidoj. La plej bone konata troviĝas ĉe Chichén Itzá sed, laŭ mia opinio, estas multaj aliaj pli bonaj, kaŝitaj lokoj ne bone konataj de internaciaj turistoj.



Bela strato en Izamal, jukatana vilaĝo kie, laŭ vilaĝa leĝo, ĉiuj konstruaĵoj en la urbcentro devas esti flavaj – la Papo Johano Paŭlo II vizitis ĉi tie en 1993



Piramidaj zonoj



Vegana fromaĝkuko

JOANNE JOHNS (MELBOURNE)

Jen facila recepto por vegana, nekuirita, kokosa kaj limeda "fromaĝ" kuko. Tiuj kiuj ĉeestis la Zamenhof-feston en Melburno eble jam gustumis ĉi tiun kaj atendas la recepton senpacience!

INGREDIENCOJ:

Subo

150 gramoj da migdaloj
140 gramoj da daktiloj
1 tekulero da nuksa butero
2 kuleroj da kokosa oleo

Supro

170 gramoj da nerostitaj akaĵunuksoj
270 mililitroj da kokosa lakto
1/2 taso da fandita kokosa oleo
Suko de tri limedoj
2 tekuleroj da acersiropon

METODO:

1. Trempu akaĵunuksojn en akvo dum almenaŭ kvar horoj.
2. Preparu bakujon - kovru la internon per plasta volvaĵo.
3. Metu la migdalojn kaj daktilojn en fortan likvigilon kaj miksu ĝis ili iĝas etaj pecoj.
4. Aldonu la nuksan buteron (aŭ ne, laŭplaĉe) kaj kokosan oleon, kaj miksu ĝis miksitaj.
5. Premu miksaĵon por la subo en preparitan bakujon.
6. Senakvigi la akaĵunuksojn kaj metu ĉiujn ingrediencojn por la supro en la likvigilon, kaj miksu ĝis la miksaĵo estas sen amaseta.
7. Verŝu la miksaĵon sur la subon.
8. Ornamu per raspita limedŝelo.
9. Metu en fridujon ĝis firma.



La ingrediencoj. Se vi ne estas vegano vi povas anstataŭigi la acersiropon per mielo.





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, David
Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Joanne Johns, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.